# HEJS JUNECO

HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO

ATOCHA, 98-4.° - TEL. (91) 230 87 98
28012 MADRID

DECEMBRO-85
N-ro 125





Kovrilo de la nova broŝuro eldonota de HEJS

# HEJS-JUNECO

Eldonas, H.E.J.S., Atoche 98-4ª 28012 Madrid

Redakcio, Sol 83-85, 41003 Sevilla

Direktoro, Alberto Franco Ramírez

Redaktoroj, Ricardo Felipe Albert Reyna
Francisco Javier Moleón

Kunlaboras, Francisco A. Antúnez Romero
Adrián Mañas Codes
Gerogo Kamaĉo

Presita ĉe Siksto-publikaĵoj Makarenofset-1985

N-ro 125

DECEMBRO 1985


## enhavo


1.................................... Kovrilo.....
2.................. Tio, kion vi vidas..................
3..............Bonvenon al novaj membroj...............
4................ Raporto pri la 45a H. K. de E-o.........
6..........................Paĝopri KAPE............
7.................. La Septembra kunveno de hejs.........
10............. Por kio taŭgas armeservo?................
13,14..............................Aliĝilo.............
15................. Informoj pri la I.S. de GEJ(A).......
16.............Menonta I.J.K en Israelo..................


Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro mem. La redaktistaro pretas lingve korekti ĉiujn kunlaboraĵojn prozajn, sed ne la versajn por ne ŝanĝi la originalajn rimon kaj ritmon.




Se ĉi tiu estas la unua fojo, kiam vi ricevas la revuon "HEJS-JUNECO", tio signifas, ke vi fariĝis membro de HEJS (Hispana Esperantista Junulara Societo) ĉar federaciano malpli aĝa ol 26. Do vi estu ege bonvenata al nia kara rondo. La servojn, kiujn HEJS proponos al vi, vi ekkonstatos tuj. Sed ni proponas al vi plian aferon: la kunlaboron. Ĉar membroj vi rajtas proponi ĉion, kion vi deziros kaj labori por la vigla konstruado de nia asocio. Ne timu skribi al ni: komuniku viajn ideojn kaj sugestojn. Partoprenu niajn kongresetojn kaj renkontiĝojn. Ĉi tiun asocion konsistigas junaj personoj, esperantistoj, kies sola celo estas, ke nia kara lingvo (kiel diris pasintrevue la junulara delegito de Barcelona Esperanto-Centro) triumfu, pli precize mi dirus, en nia junulara medio, ĉar en ĝi ni vivas. Oni ne povas kompari la sukceson de la asocia laboro kun tiu de la izolula laboro. Kune oni atingas ĉiam la plej grandajn sukcesojn. Do, se preskaŭ ĉiuj konsentas, kial ĉi asocio ne estas pli granda kaj vasta ol nun ĝi estas? La kialon oni certe devos serĉi en ies kaj iaj misantaŭjuĝoj, kies prikonsideron ni ne devos tuŝi ĉi tie. Tamen ni aŭguras bonan estonton al nia asocio, ĉar ni kalkulas pri ĉiuj vi, kiuj jam ekpartoprenas, kaj pri ĉiuj aliaj, kiuj venos kunlabori en nia rondo.

Alie ni profitas ĉi tie la okazon por danki Barcelona Esperanto-Centro-n pro la aŭkcio de ceramikaĵoj favore de HEJS, kiun ĝi organizis en la kartagena kongreso, kaj personе s-anojn Aragay kaj Alberich pro la bona organizado kaj gvidado de tiu aukcio. Krome ni devas danki ankaŭ s-aninon Faustina Martínez pro milpeseta donaco al HEJS. **H-J**

NIA RAPORTO:

# 45-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

KARTAGENO (MURCIO), de la 5a ĝis la 9a de Julio.

VENDREDON: Oni malfermis la kongreson kaj konatiĝis la esperantistoj.

SABATON: Je la 9-a oni paroladis pri kanabo (s-ano Manuel López Serna). La konferenco estis tre interesa kaj la esperantistoj tre ŝatis ĝin. Je la 10-a oni vizitis la urbon, je la 11-a la tre belan Urbodomon, kie iu reprezentanto bonvenigis ĉiujn esperantistojn. Je la 12-an okazis la solena inaŭguro de la Kongreso. Parolis la prezidanto de la Kartagena E-Grupo per bonvenigaj kaj kuraĝaj vortoj. Poste salutis eksterlandanoj. La nova prezidanto de la Federacio legis salutleterojn i. a. de UEA kaj HEJS, Parolis ankaŭ delegito de la murcia registaro, kiu flatis E-on. Je la 16-a okazis kunveno de H.E.F. Oni informis pri 9 novaj grupoj aliĝintaj, pri la bulteno de HEF, ebla reeldono de la vortaro de Tudela, plendo de kelkaj katalunoj por ke HEF ne aidu en Barcelono, farado de Loterio, pri la uzo de la HEF-oficejo en Madrido, ktp. Je la 6-a okazis prezentado de novaj libroj kaj la komenca klaso de elementa E-o, kiu ripetiĝis en sekvantaj tagoj. Je la sepa la antaŭa prezidantino de HEF prelegis pri la maro kiel faktoro de Komunikado (kongrestemo). Je la oka okazis folkloraj regionaj dancoj kaj kantoj , kiuj tre plaĉis al la kongresanoj forte plaŭdantaj je la fino.

DIMANĈON: Matene oni inaŭguris novan straton en Kartageno kun la nomo "Idioma Esperanto". Poste oni inaŭguris aliajn tra la provinco. Oni ekskursis tra la Varmeta Marbordo. Je la 9-a okazis kunveno de HEF. Poste oni vespermanĝis.

LUNDON: Je la 9-a matene okazis parolado pri etiko (Giordano Moya). Je la deka okazis kunveno de la Hispana Jubilee Komisiono kun reprezentantoj de la E-Asocioj kaj aktivuloj. Samhore okazis ambaŭnivelaj ekzamenoj. Je la 11.30-a okazis Omaĝo al niaj forpasintoj. Poste salutis la E-Grupoj de Hispanio, reprezentanto de ILEI kaj de HEJS, kiu petis

pliĉipan loĝeblecon por junuloj en la venonta Kongreso de Vigo. Krome li montris la apogon de HEJS al la nova estraro de HEF. Je la 12-a kaj duono oni iris al bierfabrikejo de Kartageno, kie oni povis spekti la fabrikadon de biero kaj aŭskulti kiel oni faras. Je la kvina okazis la kunveno de HEF, kie oni traktis la elspezojn kaj enspezojn , kaj sekve la prezidanto parolis pri aliaj aferoj de nia movado. Je la 18-a horo okazis la "trovoj". La trovistoj kun granda inspiro deklamis la trovojn,kaj ĉiuj estis ĉarmataj aŭskultante ilin. Je la 9-a okazis parolado pri "solvo al krizo: energia atomkerno kaj tamen pura". Parolis M. López Hernández. Nokte okazis la junulara aranĝo, kie oni trinkis kaj diboĉis dum preskaŭ la tuta nokto.

MARDON: Je la 9-a matene Alberto Franco parolis pri "Andaluzia fonetiko". Je la deka oni vizitis la mararkeologian muzeon. Je la kvara okazis kunveno de redaktoroj de E-revuoj. Je la kvina vespere okazis parolado pri "Bahaismo kaj E-o" far Adrián Mañas. Je la 19.00-a S-ro Aniceto Valverde hispane prelegis pri la maro kaj ĝiaj riĉofontoj,kaj oni projekciis lumbildojn. Je la 20.30-a oni legis la rezultojn de la kongreso: peti la eldonon de poŝtmarko rilate la jubileon, realigi kursojn de E-o per video, ktp. Post paroloj de la prezidanto oni fermis la kongreson kaj kantiĝis la E-himno. Je la 21-a okazis bankedo kaj la aŭkcio de ceramikaĵoj favore de HEJS dank' al Barcelona Esperanto-Centro.

ADRIÁN MAÑAS CODES




Pluraj LKK-anoj de la kongreso

# KAPE

Finiĝis la 3-a Andaluzia Kongreso de Esperanto (memoru, Sevilon Aŭguste) sukcese, kaj precipe en la komputora kampo. La strebo de multaj homoj, precipe junaj, kiuj emis al Komputiko per kaj por Esperanto realiĝis per la kreo de nova asocio: K.A.P.E., t.e., komputoramantoj por Esperanto. La iniciato ekis de nia samideano M. Angel Sancho, kiu gvidis kurseton pri elementa komputiko dumkongrese. La asocio kreiĝis kaj deziras fakte funkcii tuj. La unua pleno estas la eldonado de programoj kaj prikomputikaj laboroj en revueto, kiu principe nomiĝos SE... DO... kaj aperos ene de HEJS-JUNECO. Krome en la Vintra Kunveno de HEJS oni decidis, ke KAPE estu faka sekcio de HEJS, per kio ĝi ricevos la apogon moralan kaj fizikan de nia plej granda asocio. KAPE havas jam faktajn membrojn (ankoraŭ malmultajn) kaj atendas pliajn personojn, kiuj emos al kuna kunlaborado en tiu kampo. Do esperantistoj komputoramantaj de tuta Hispanio (principe) estas vokataj partopreni en tiu nova asocio. Eĉ jam stariĝis grupete de Spektrumemaj ene de KAPE, sed krome oni jam laboras en programoj por lernigo de Esperanto, apliko de komputiko al niaj klasoj, ktp.

Pliajn informojn vi povas atingi adresante al:



KAPE
Atocha, 98-4º 28012 MADRID
aŭ
Pozo, 3 41003 SEVILLA

Ni atendas vin kaj vian kunlaboron. Ek!

SE..DO... Baldaŭ aperos

# SEPTEMBRA KUNVENO

De la 20a ĝis la 23a de septembro en Madrido.

Kunvenis junuloj el diversaj lokoj. Apenaŭ sufiĉis tiu tempo por ĝui tiun etoson kaj por densaj diskutoj, pri kelkaj el kies rezultoj vi jen legos.

Kiel sciate, la sekvajara HEJS-tendaro okazos en Zaragozo ĉe Pasko. Ĝi daŭros de la 27a ĝis la 30a de marto de 1986. Kie? Nu, verŝajne en la Junulara Gastejo BALTAZAR GRACIÁN, en la urbo mem, por kies uzo necesas junulara karto. Tial ni esploras pri komuna (grupa) eventuala senpaga aliĝebleco al la restadejo, sed ni ne manĝu antaŭ ol kuiri, ĉu klare?. La LTK (Loka Tendara Komitato) sendos aliĝilojn al la membroj de HEJS kaj al la grupoj, kaj oni projektas apartan bultenon ĝis la tendaro kun ĉiaj eventualaj informoj (ekz. aliaj loĝeblecoj -verŝajne tendumejo-). Ni ĉiuj konsentas, ke ĉiu pagu sian propran restadon kaj elspezojn. Tamen kiel dirite ni klopodos por atingi senpagan tranoktadon. Tiom pri la restado. Pri la aliĝo sciu, ke la membroj de HEJS rajtas aliĝi senpage; junuloj nemembroj devos pagi 200 pesetojn kaj personoj pli aĝaj ol 25 pagos 500 pesetojn.

Alia diskutita temo estis tiu de JUNAJ VERKISTOJ. Kelkaj el ili kunvenis kaj sciigis, ke jam ekzistas pluraj manuskriptoj. Do ŝajnas, ke la afero progresas. Oni ankaŭ esploris pri diversaj manieroj financi la entreprenon kaj presi ĝiajn fruktojn. Evidente io moviĝas en la kultura vivo de nia juna Esperantio.

Ankaŭ alia faka agado montras sin vigla. Mi parolas pri KAPE (Komputor-Amantoj Por Esperanto), kiuj ŝajnas labori ... kape. Nu, HEJS apogos KAPE-n kaj helpos ĝin ekvivi, nur se KAPE fariĝos ĝia sekcio pri Komputiko. Nura formalaĵo, kiu povas nur utili al ambaŭ. Kiel ajn okazos, la unuan numeron de la organo de KAPE ("SE... DO") oni decidis aperigi ene de la venonta HEJS-JUNECO por reciproka interkonatiĝo. "Vent´ el poŭp´ kun plena velo".

Jam pli frue ni rekomendis la organizadon de kursoj sub la aŭspicioj de HEJS por iel profiti la prijunularan ĉija

ran propagandon kaj altiri plimultajn lernantojn. Ofta sekvo de kurso estas ekzamenoj. Tial HEJS intencas pliampleksigi sian agadkampon al tiu fako kaj eventuale starigos ekzamenojn por tiuj dezirantaj kontraste kontroli sian lingvokapablon. Tiuj ekzamenoj respondos al la postuloj de aliaj altkvalitaj ekzamenoj. Sola diferenco estas, ke oni certigos la kompetentecon de ĉiuj ekzamenantoj juĝi alies lingvokapablon. Oni liveros koncernajn atestilojn pri sukceso ĉe l'ekzameno. Tiam ne esprimita kritiko estas, ke el tiuj povos fariĝi nur sencelaj ekzamenoj; sed amiko! kiu havas abelojn, havas mielon[z] (ne tute en PIV-a senco).

Kompreneble multo alia okazis en tiuj tagoj. Sed la sukon de momento koaguliĝas en senmovaj literoj. Kaj, krom tio, mia memoro tro malfortas por reteni tiun amason de scioj meaiĝintaj en etoso tiel malsimila al la ĉiutaga.

**ZARAGOZO-86. 10a RENKONTIĜO DE HEJS. 27a - 30a de marto.**

(Provizora programo)

ĴAŬDO,27a: 20a horo: Interkona Vespero
Disdonado de dokumentoj

VENDREDO: 10.30a horo: Oficiala malfermo
11.30a " : Elementa Kurso de E-o (1-a sesio)
Fakaj kunvenoj: Junaj verkistoj
13.00a " : Vizito al la urbo
17a " : Ordinara kunveno de HEJS
Elementa kurso de E-o (2-a sesio)
Fakaj kunvenoj: KAPE
21a " : Distra kunveno en trinkejo

SABATO: 9.30a horo : Sporta praktikado.
11.30a " : Elementa kurso de E-o (3-a sesio)
Fakaj kunvenoj
12.30a " : Vizito al la Aljafería
17a " : Prelegos akademiano FERNANDO DE DIEGO.
Eventuala posta debato.
20a " : Komuna foto.
21.30a " : Kuna noktomanĝo.

DIMANĈO: 11.30 horo : Elementa kurso de E-o (lasta sesio)
12.30 " : Debato(kiel atingi bonan lingvokapablon)
17a " : Fermo de la Renkontiĝo.

"Rostita Kolombeto ne flugas al Buŝeto". Tiu zamanhofa frazo celas esprimi la opinion, ke oni mem devas zorgi siajn interesojn, ke senmova restas senrimeda. Sed el tio ni ne rajtas supozi, ke la mankoj de rezultoj implicas mankon de iniciatoj kaj agadoj. Pli atenta trarigardo senmaskigos la misrezonon. Kial mi aludas ĉi temon? Aŭskultu. Vi eble memoras, ke oni iam anoncis tiun aŭ alian agadon, pri kiu neniam plu ĝis hodiaŭ vi reaŭdis. Kio estis? Ĉu la tuto sinkis en la nenion? Aŭ ĉu temas nur pri ioma senĉesa glitado en la plej profundan el la songôj? Nu, eble estas tiel en tre multaj okazoj. Iu kuraĝas en entuziasma momento entrepreni taskojn super sia kapablo. Kio do? Sekve la surmetita ŝarĝo ekpezas sur la ŝultroj, poste sur la lumboj, kaj fine nia kuraĝulo rezignas kunporti eĉ plej etan plumon. Aŭ eble la tasko ne estas ne estas superhoma, kaj tamen malfacila momento povas sekvigi similan rezulton al la antaŭa. Sed foje, nur ke iu tasko postulas longan prilaboron, kiel scias nur, kiuj ĝin ellaboras. Same estas pri broŝuroj. Eĉ se projektita antaŭ pluraj monatoj, pro la fakta disigiteco de la respondeculoj nur en septembro ni finfine! redaktis hispanlingvan broŝuron pri HEJS kaj la praktikaj flankoj de Esperanto por la junuloj. Ĝia kosto estis jam antaŭvidita en la budĝeto, tial ne estiĝos problemojn. Do jen vi havas konkretan paŝon por disponigi informojn pri nia lingvo necesan se konsideri la ĝeneralan mis- kaj neinformatecon en junularaj medioj.

Ne aperis ĝis nun versioj en aliaj hispaniaj lingvoj, ĉar neniu el la redaktistoj sufiĉe scipovas ilin. Tial bonvenas ĉiaj proponoj, prefere por realigo de broŝuroj en kataluna, galega kaj vaska. Kompreneble tio koncernas vin nur se Esperanto interesas vin, Se jes, rememoru: rostita kolombeto ne flugas al buŝeto[z].

**Rikardo Filipo Albert' Rejna**
**Ĝenerala Sekretario HEJS-a**

# Por kio taŭgas armeservo

**Okaze de la pasintjara lotado pri la lokoj, kie devos armeservi multaj hispanaj junuloj, la revuo Cambio 16 komisiis al enketentrepreno sondadon por koni la opinion de la hispanoj rilate la armeservon.** Ties rezulto estas sufiĉe memklara: 70% el la hispanoj opinias, ke la armeistoj profitas por si mem la soldatojn; 60%, ke la armeservo estas malprofitdona. La soldatoj opinias eĉ pli malbone pri tiu servo: 83% el ili dubas pri ĝia utileco, ĉar laŭ la plimulto ĝin farante "oni lernas malagi" kaj "oni akiras malvirtaĵojn".

Malgraŭ ĉi tio dirita, la hispanoj ne estas akre kontraŭ-armeaj, ĉar fakte 47% el ili opinias la armeservon bona por la junuloj (kontraŭ 28% opinianta male); oni kontraŭstaras la metodon, la kondiĉojn; oni volas modernigi la armeservon, kies nuna stato ne taŭgas por la nacia defendo, ĉar la soldatoj eĉ ne ellernas uzi la fusilojn. Tiu estas la fakto: la armeo ne scias kion fari per la rekrutoj, tiel la tempo por far nenion estas troa, kaj kiel rezulto aperas enuo kaj malfeliĉo, kiuj inklinigas la soldatojn al la drogoj (ĉefe al la alkoholo). La Ministerio pri Defendo ne agnoskas, ke drogo estas specifa problemo de la armeo, ĉar ĝi estas ĝenerala problemo de la socio, sed fakto estas tio, ke en kazernoj la drogkonsumado kreskas alarme, kaj la junuloj tute fajfas pri armeaferoj. Nun ne taŭgas al voko al patriotismo nek al elviriĝo por allogi ilin (nin): laŭ la enketo kun la frazo "la sanaj junuloj, kiuj ne volas armeservi estas malpatriotoj" ne konsentas 55% el la loĝantaro kaj 72% el la soldatoj.

Pri la akcidentoj dum la armeservo timas pli la loĝantaro ol la armeservantoj; ĉi tiuj ne pensas, ke iĝi estas tre oftaj, sed ĉiuj koincidas pri tio, ke iĝia plej ofta kaŭzo estas la senrespondeco de junuloj. Kie plej oni timas la akcidentojn estas en la Ministerio pri Defendo. Ne vane en 1984 vunditis soldato po ĉiu 160-o de minutoj, mortis po ĉiu 44-o de horoj kaj provis sinmortigi po ĉiu 80-o de horoj (el kies provoj efektiviĝis 40%). Laŭ statistikaj informoj rezultis pli da vunditoj kaj mortintoj en la arme-

servo ol en aliaj civilaj laboroj. La plimulto el tiuj akcidentoj okazis ekster la servhoroj kaj dum vojaĝoj pro forpermesoj. Laŭ la Ministerio, por eviti tiajn akcidentojn oni devus unue malebligi mallongdaŭrajn forpermesojn, kaj due agrabligi la kazernojn , por ke la soldatoj ne forkuru el ili por esti kun siaj familioj kaj fianĉinoj nur dum kelkaj horoj.

Sed la problemo, kiu plej maltrankviligas la aŭtoritatulojn kaj la armestabon estas la grandega nombro de memmortigoj: en 1984 118 soldatoj provis sinmortigi, 41 el ili plenumis sian celon. La indico de memmortigo estas eĉ pli granda en armeservo ol en malliberejoj. Por provi eviti tion, de ĉi jaro oni faros psikologiteston al la rekrutoj por trovi tiujn psike nestabilajn, sed oni devas dubi pri la efikeco de tio, ĉar ja multaj junuloj eĉ simulas esti frenezaj por ne armeservi , kvankam multaj ne sukcesas.

Laŭ multaj fakuloj ne utilas solvi unuope ĉi ĉiujn problemojn, ĉar la fakto estas tio: 80% el la soldatoj opinias, ke oni devas multe malgrandigi la daŭron de la armeservo; 85% asertas, ke ili lernas nur malagi, kaj 62% pensas, ke armeservo estas nur lernejo pri malvirtaĵoj. Do la tuta sistemo de deviga armeservo estas en krizo. Necesas profunda reformo.

JEN KELKAJ REZULTOJ EL LA ENKETO:

| ĈU BONAS POR LA JUNULOJ FARI ARMESERVON? | Loĝantaro (%) | Soldatoj (%) |
|---|---|---|
| - Bonas | 47 | 23 |
| - Nek bonas nek malbonas | 23 | 26 |
| - Malbonas | 28 | 51 |

| KIA ARMESERVO ESTAS PLI BONA POR LA SOCIO | Loĝantaro (%) | Soldatoj (%) |
|---|---|---|
| - Deviga | 34 | 17 |
| - Volonta | 63 | 82 |

| | Loĝantaro (%) | soldatoj (%) |
|---|---|---|
| **LA SOLDATOJ RICEVAS BONAN ARMEINSTRUADON** | | |
| - Konsentas | 51 | 33 |
| - Malkonsentas | 46 | 68 |
| **KIOM DA TEMPO DEVAS DAŬRI ARMESERVO?** | | |
| - Malpli ol unu jaron | 60 | 80 |
| - Unu jaron | 35 | 18 |
| - Pli ol unu jaron | 4 | 1 |
| **OPINIO PRI LA DUJARA SERVO CIVILA POR ARMERIFUZANTOJ** | | |
| - Bona | 21 | 18 |
| - Devas daŭri unu jaron | 55 | 61 |
| - Inter unu kaj du jarojn | 6 | 10 |
| - Ne devas esti permesata | 12 | 10 |
| **TIU SANA JUNULO, KIU NE VOLAS ARMESERVI ESTAS MALPATRIOTO** | | |
| - Konsentas | 43 | 28 |
| - Malkonsentas | 55 | 72 |
| **KAZE DE MILITO, ĈU VI MORTUS POR VIA LANDO?** | | |
| - Jes | 41 | 32 |
| - Ne | 34 | 41 |
| - Dependas de tio, kontraŭ kiu estus la milito | 20 | 19 |

==================== Francisco A. Antúnez Romero ==========

# Akvo

## savinda kaj savenda

# 29a internacia seminario

**Germana Esperanto-Junularo + Germana Esperanto-Asocio**

## 27 decembro 1985 – 4 januaro 1986

## Eschwege, F.R.Germanio

***Aliĝoj:*** *Thomas Pusch, Am Schwertberge 23, D-2845 Damme*
*Tel.: F.R.Germanio 05491-2715*

***Pagoj:*** *Poŝtĝirkonto* ***545 77-754*** *en Karlsruhe je la nomo "Germana Esperanto-Junularo" kun indiko "29-a IS"*

# aliĝilo

***Mi aliĝas al la 29-a Internacia Seminario (Eschwege, 27 dec. 1985 – 4 jan. 1986) je ĉi-dorsflankaj kondiĉoj.***

Familia nomo: ______________________ nask.: ____________

Persona nomo: ______________________ sekso: ____________

Adreso: ______________________________________________

______________________________________________

Lando: ______________________ Telefono: ____________

Ne plenigu:

| *aliĝ. ric.* | *pago ric.* | | *kotizo* | *rabato* | *antaŭp.* | *resto* |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | |

# Akvo

***savinda kaj savenda***

# kotizoj

| | | DM | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| | | **aliĝo antaŭ** | | | |
| | | 01.08.85 | 01.10.85 | 01.12.85 | poste |
| **aĝo je 27.12.85** | 0 - 1 jaro | 0 | 0 | 0 | 0 |
| | 2 - 5 jaroj | 50 | 60 | 70 | 80 |
| | 6 - 13 jaroj | 100 | 110 | 125 | 140 |
| | 14 - 25 jaroj | 150 | 170 | 190 | 210 |
| | super 25 jaroj | 220 | 240 | 260 | 280 |
| | paroj | 420 | 460 | 500 | 540 |

| | | |
|---|---|---|
| **Memzorgantoj** | personoj kiuj partoprenas nur la programon sed loĝas ekstere | 30 DM |
| **Krompago** | germanoj pli ol 25-jaraj, ne. ordinaraj GEA-membroj | 40 DM |
| **Rabato** | por eksterlandaj plenkotizaj partoprenantoj en aĝo de 14 - 25 jaroj | 20 DM |
| **Subvencio** | GEJ-membroj kaj eksterlandanoj en aĝo de 14 - 25 jaroj ricevas vojaĝsubvencion *nur por* ***plentempaj*** *partoprenantoj !!* | |

# kondiĉoj

- *La* ***kotizo*** *inkluzivas programon kaj komunajn loĝadon kaj manĝojn en la IS-ejo. - Laŭ deziro ni peros al vi ĉambron en hotelo je viaj kostoj.*
- *Via aliĝo ekvalidas nur kun* ***antaŭpago*** *de minimume 50 DM (memzorgantoj 30 DM) por ĉiu unuopa persono al la indikita konto. La antaŭpago estas parto de la kotizo. - Por aliĝantoj el netranspagipovaj landoj kiel aliĝdato validas la dato de alveno de la aliĝilo ĉe la aliĝadreso.*
- *Nur post ĝustatempa* ***malaliĝo*** *ĝis plej malfrue unu monato antaŭ la IS ni repagos vian antaŭpagon minus 10 DM.*
- *Via aliĝo estas* ***transdonebla*** *al alia persono, sed ni alĝustigos la kotizon laŭ la aĝo de la anstataŭanto. Ties kotizo tamen ne povas esti malpli alta ol la origina kotizo.*
- *Eblas* ***partatempa partopreno****, sed ni favoros plentempajn aliĝojn: unu monaton antaŭ la IS ni disdonos la liberajn lokojn al partatempaj aliĝintoj laŭ aliĝdato.*
- *La* ***kotizo por partatempa partopreno*** *estas la plej alta kotizo en la respektiva aĝkategorio, dividite per 7, multiplikite per la nombro de partoprentagoj.*
- *Se vi ne eksplicite indikas partatempan partoprenon en via aliĝilo, ni konsideras vin tuttempa kaj plenkotiza partoprenanto. Vi povas ŝanĝi la daŭron de via partopreno ĝis plej malfrue unu monato antaŭ la IS:*
- *Nur post ĝustatempa aliĝo (ĝis 10 decembro 1985) vi estas* ***asekurita*** *pere de GEJ/GEA kontraŭ kompensdevo kaj akcidento dum la IS.*

## *Germana Esperanto-Junularo + Germana Esperanto-Asocio*

Mi aliĝas kiel

☐ tuttempa partoprenanto

☐ partatempa partoprenanto

de ___________ ĝis ___________

☐ memzorganto (mi nek loĝas nek manĝas en la IS-ejo)

☐ paro kune kun _________________

(aparta aliĝilo por ambaŭ)

☐ Se eblas, mi volas loĝi kune kun

_______________________________

☐ Mi petas peri al mi ____-litan ĉambron en proksima hotelo.

☐ Mi venos per aŭto kaj serĉas kunveturantojn.

☐ Mi ŝatus kunveturi en aŭto kaj serĉas ŝoforon.

Mi agnoskas la suprajn kondiĉojn.

Precipe mi konscias, ke mia aliĝo validas nur ek de la dato de mia antaŭpago (por netranspagipovaj landoj ek de alveno de mia aliĝilo).

Dato: ___________________ Subskribo: ___________________________

# SALUTON !

*Jen la invitilo por la 29-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj Germana Esperanto-Asocio (GEA). Kiel ĉiujare, ĝi okazos dum unu semajno ĉirkaŭ la jarŝanĝo, sed ĉi-jare ĝi estos speciale avantaĝa por vi:*

***Ni tenis la kotizon de la du lastaj IS-oj, kiuj daŭris sep tagojn; sed por la sama kotizo vi ĉi-jare ricevos eĉ ok tagojn !***

## CELGRUPO

*La IS celas unuavice lingve progresintajn Esperanto-parolantojn, kiuj kapablas sekvi la prelegojn kaj aktive partopreni la programon. Ne nur junuloj sed ankaŭ mezaĝuloj (kun aŭ sen infanoj) estas bonvenaj; infanoj estos bone prizorgataj: por ili okazos aparta programo.*

## PROGRAMO

*Medipolucio dum la lastaj jardekoj iĝis minaca kaj tre grava problemo ne nur en Eŭropo. La vivnecesa substanco **akvo** verŝajne estas la plej granda "rubujo" por kemiaĵoj rezultantaj el industriaj procesoj. Mortado de arbaroj pro "acida pluvo", malpurigo de la subtera akvo pro nitratoj kaj fosfatoj el la industriigita agrikulturo kaj pro la troa uzo de lavkemiaĵoj, enfluigo de industriaj kemiaĵoj en riverojn, la "forigo" de acidoj per elfluigo el specialaj transportŝipoj en la maron estas kelkaj el la subtemoj, kiujn ni traktos dum la IS en laborgrupoj, kursoj, forumoj kaj prelegoj. Aliflanke ankaŭ priparoliĝos ekz. la rolo de "akvo" en diversaj kulturoj.*

*Ni volonte akceptas ĉiuspecajn kontribuojn de kompetentuloj pri la temo. Kontribuantoj ricevos apartan rabaton kaj vojaĝsubvencion. Do: se vi sentas vin kapabla kaj ema, skribu al:*

***Wilfried Hinrichs, Zellbach 6, Klepperberg, D-3392 Clausthal-Zell.***

*Krom la labora parto vi kompreneble ankaŭ povos ĝui ampleksan distran programon, interalie tradician grandan silvestran balon.*

## LOKO

*Eschwege situas en norda Heslando proksime de la limo inter FRG kaj GDR. La limtransirejo Gerstungen/Herleshausen apudas.*

*La IS-ejo estas nova moderna junulara domo kun 2- ĝis 8-litaj ĉambroj.*

# 42-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto

Neurim, Israelo, 14-21 aŭgusto, 1986

Adreso: 42-a Internacia Junulara Kongreso, P.O.K. 22041,
IL-61220 Tel-Aviv, Israelo.